

Robert Burns,
Vi bordoj de la bela Dun'

tradukita de Agnes B. Deans

Vi bordoj de la bela Dun',
ho, kiel povas flori vi?
Ho, kial kantas vi, birdar',
dum zorgoplena estas mi?

Trilanta birdo de l' arbar'.
Komencas krevi mia kor';
aŭdante vin, memoras mi
pir ĝojoj jam pasintaj for.

Mi ofte, ho belega Dun',
senzorge vagis apud vi;
pri amo kantis ĉiu bird',
kaj same ĝoje kantis mi.

Kun koro ĝoja for de l' arb'
rozeton dolĉan prenis mi;
aminto mia ŝtelis ĝin,
sed akran dornon lasis li.

*Traduko de la Scottish poemo "Ye banks and braes o' bonnie Doon" de ROBERT BURNS (*1759-01-25 – †1796-07-21) en Esperanton de Agnes B. Deans.*

Arg-1024-2076 (2014-06-02 07:40:33)

Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro "Internacia Kantaro", eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt und Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio. La kantojn kolektis kaj eldonis Paul Bennemann. Vidu ankaŭ: <http://www.reocities.com/lilandr/kattoj/popolaj/skotaj/ViBordojDeLaBelaDun1.htm>. La muziknotoj de la kantoj troveblas en http://books.google.de/books?id=bvyS1UxGBUC&pg=PA591&lpg=PA591&dq=Robin+Adair+Robert+Burns&source=bl&ots=iUqYPvA3na&ig=GzREVUt2liw_lm6uNXidZEC6Xqk&hl=de&sa=BeI=MXKEU6GhMaIA4gTBz4CYAw&redir_esc=y#v=onepage&q=Robin+Adair+Robert+Burns&f=false, sur paĝo 442.